# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo majo 2023**

## NACIAJ KAJ INTERNACIAJ KONGRESOJ

Atentu: la 30an de aprilo finiĝas la unua aliĝperiodo por la Hispana Esperanto-Kongreso, kiu okazos ĉijare en Sevilo inter la 12a kaj 15a de oktobro. La unuaj informoj kaj la aliĝilo troviĝas en la retejo https://kongreso.esperanto.es/.

Memoru ankaŭ ke la ĉijara Universala Kongreso de Esperanto okazos en Torino (Italio), inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto. Jam pli ol mil homoj aliĝis. Programo kaj aliĝilo troviĝas en la retejo de UEA: https://uea.org/kongresoj.

Tuj poste, en apudmara urbeto de Italio, nomata Lignano Sabbiadoro, okazos samtempe la Internacia Junulara Kongreso, organizata de TEJO, kaj la Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Pluraj madridanoj aliĝis jam al tiuj someraj renkontiĝoj.

## EKSPOZICIO POR LA NOKTO DE LA LIBROJ

Kiel anoncite, Madrida Esperanto-Liceo partoprenis la iniciaton "La Nokton de la Libroj", organizitan de la Madrida regiona registaro okaze de la internacia tago de la libro. La 21an de aprilo estis prezentita malferma ekspozicio de libroj de latinamerikaj verkistoj tradukitaj al Esperanto, en la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio.



## MIGUEL FERNÁNDEZ PRI LORCA

Ankaŭ okaze de la Nokto de la Libroj (kvankam fakte tio okazis matene), la "Casa San Cristóbal" de Fundación Montemadrid, en la distrikto Villaverde, invitis la esperantan poeton Miguel Fernández partopreni en renkonto titolita "Ni babilu pri Lorca", okaze de la 125a datreveno de la naskiĝo de Federico García Lorca. La renkonto, dum kiu Miguel estis prezentita kiel esperantista poeto kaj tradukisto de Lorca, celis ĉefe la studantojn de mezlernejo I.E.S San Cristóbal de los Ángeles, sed oni ankaŭ rezervis spacon por la ĉeesto de ĝenerala publiko. La agado okazis la matenon de la 21a de aprilo.

MEL profitis la okazon por donaci plurajn librojn pri Esperanto al la biblioteko de tiu institucio.






## LEGADO DE DONKIĤOTO



La 20an de aprilo, du esperantistoj, Miguel kaj Elsa, partoprenis la sinsekvan legadon de la verko Don Quijote, organizatan de la Círculo de Bellas Artes. Ambaŭ legis po unu pecon de la traduko en Esperanton de tiu fama verko.

Vi povas spekti ilian legadon en la adreso: https://www.youtube.com/watch?v=J6CyZ31QN_w.

## KULTURA VIZITO

La 13an de aprilo, grupo de 15 esperantistoj kaj amikoj ĝuis gviditan viziton al la ĉambroj pri Romia Hispanio de la Nacia Arkeologia Muzeo.

## PREZENTADO EN LIBERECANA MEDIO




En la semajnfino de la 6a kaj 7a de majo Liberecana Ateneo de Carabanchel-Latina organizas eduktagojn por liberecana kulturo. Inter ili, la dimanĉon, je la 11 matene, estas programata prelego kaj debato pri Esperanto kaj kultura justeco, kiun kunordigos Félix Jiménez Lobo.

La loko estos la EKO (socikultura memregata spaco) en strato Ánade, 10 (metrostacio Oporto).

## KUNVENOJ KAJ RENKONTOJ

La monata unuasabata rendevuo okazos la 6an de majo en la kutima loko, la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Esperanto, n. 2, de Madrido (metrohaltejo Alsacia, lineo 2).

Ni daŭrigas la renkontiĝojn en la sidejo, ĉiujn lundojn (krom la festajn) ekde la 18,30 horo. Ni proponas komunajn paroladojn, legadojn kaj deklamadojn.

Ankaŭ la grupo de Fuenlabrado, Fuenlabrada Esperanto-Ligo, rendevuas ĉiujn ĵaŭdojn, ĉirkaŭ la 6a vespere, en sia sidejo, en la CEPA Paulo Freire (metrohaltejo "Fuenlabrada Central")

Memoru ke ĉiuj estas bonvenaj al la renkontiĝoj, lundaj, ĵaŭdaj kaj sabataj, sendepende de la nivelo de la lingvokono.

## PLIAJ INFORMOJ

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

Por informiĝi pri tutmondaj renkontiĝoj, vizitu la retejon https://eventaservo.org/.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com